# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr


## Ekspozicio en Parizo

## *Memori:*

## *"Hiroŝimo - 60-jarojn poste"*




Desegno de 12-jara japana infano favore al la PACO Foto: K.Barković


Novembro 2005 76-a jaro, n-ro 11 (1205)


MENSUEL / MONATA

ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €


SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Ekspozicio en Parizo

# *HIROŜIMO - 60 JAROJN POSTE*





Maldekstre: Urbestroj de tri urboj - s-ro B. Delanoë (Parizo), s-ro Iccho Itoh (Nagasaki) kaj s-ro Tadatoshi Akiba (Hiroŝimo)




Laŭ la iniciato de Pariza urbestro s-ro Bertrand Delanoë kaj kunlabore kun la urbestroj de Hiroŝimo kaj Nagasaki, okazis de 05.09. ĝis 04.10.2005 en la Pariza urbodomo, ekspozicio : "Hiroŝimo - 60 jarojn poste. Sur la foto: Panelo antaŭ la urbodomo.



Kvarpersona delegacio de la P.K. de SAT kaj de la Ĝ.K.-aro vizitis la ekspozicion kaj donacis al la organizantoj bone konatan ilustritan libron "Hiroŝima-Nagasaki" - en Esperanto. Sur la foto: ge-kdoj Sabatier, Charlot kaj Cavalier. Mankas k-do Barkoviĉ kiu fotis.




Neniam plu io tia. La sola revo de infanoj estas PACO! Jen plia infandesegno tiucele.



Infanaj desegnaĵoj inspiritaj per la katastrofo. La bildoj montras kadavrojn kaj bruligitajn homojn, bestojn kaj objektojn post tiu militkrimo.



Kelkaj metalaj kaj vitraj objektoj trovitaj post la eksplodo. Plej parte ili estas fanditaj pro terurega varmo.



Fine de la vizito de la ekspozicio, la vizitantoj estas invititaj per japana faldarto "Origami" krei paperan gruon (pacobirdo) kaj deponi ĝin sub la grandan metalan gruon (foto).

Fotoj: Kreŝimir Barkoviĉ




NENIAM PLU TIA KRIMO ! NI POSTULU ĜENERALAN SENARMIGON KAJ DETRUON DE ĈIUJ ARMILOJ !

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*kun tiu ĉi numero vi trovas referendumilon por la elekto de la nova P.K. de SAT kaj de Ĝ.K.-anoj por horzonoj. Bonvolu tuj voĉdoni kaj resendi la referendumilon al la SAT-Centro. Dankon.*
*Krom tio vi trovas la aliĝilon por nia kongreso en Beogrado. Por sukcesigi ĝin necesas partoprenantoj. Do, se vi vere ŝatas vian Asocion kaj opinias ke SAT estas necesa, progresema, neneŭtrala asocio, montru tion per via partopreno al la kongreso. Ja, kongreso estas unu el la plej altaj instancoj de SAT (tuj post referendumo) kaj ni nepre subtenu ĝin. Krome vi vivos tre agrablan semajnon en bela urbo kaj kamaradeca SAT-etoso.*

*La Redaktoro*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❒
Imprimé par : EDRB, Avenue Mozart, FR-75016 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.




# POR LA PACO !

## Marŝo por la paco kaj justeco de la popoloj

La Marŝo por la paco kaj justeco de la popoloj okazis la 11an de septembro 2005. Ĝi startis de Peruĝo je la 9a kaj atingis Assisin je la 15a h. Ni, italaj esperantistoj rendevuis pli sube ol Peruĝo ĉar kelkaj venis buse. La flago estis tuj malvolvita kaj aperis skribaĵo "Esperanto la lingvo de la paco" sur ĝi.



Do nia verda flago marŝis kun ni.

Ĉu ĝi estis pacista? Ĉu ĝi estis maldekstra? Ĉu ĝi estis ia?

Mia koro donis unufoje respondon: Ĝi estas esperantista!!

Dum ni marŝis estis aliaj esperantistoj ĉe la fino de la marŝo disdonantaj flugfoliojn pri E-o. Fine mi ankau renkontis Luigi Tadolini (Luiĝi Tadolini), 84-jaran esperantiston paciston, kiu estis apud Aldo Capitini (Aldo Kapitini), la pacisto kiu inaŭguris la Marŝon en la jaro 1961.

Dum la Marŝo multaj homoj interesiĝis pri ni, demandis ion pri E-o, eĉ kelkaj timis ke la verda flago estus la verda flago de partio raciista, nome Lega Nord!!!!

Mi estis fiera porti nian flagon, ĉar kutime esperantistoj marŝis sed ne kunigitaj de iu alvoko, kiel okazis ĉijare.

Je la fino de la marŝo okazis ŝtormo kaj ĉiuj provis ŝirmi sin ie. Bonŝance ni estis ĉe la fino en S. Maria degli Angeli, kie estas bele konservita malgranda preĝejo de Sankta Francisko, nomata "Porciunkola".

Kion diri pli? La tago de la Marŝo de la Paco estis antaŭita de la Kongreso de la popoloj kaj de la Kongreso de la junuloj, kie italaj junuloj intervenis favore al Esperanto.

Dum la Kongreso de la popoloj intervenis multaj homoj de la suda parto de la mondo, kiuj reprezentis tre klare situacion de sia lando. Estis ankau intervjuo kun kandidato al la posteno de ĉefministro por Italio, Romano Prodi, por konsciigi lin pri la grava tasko kiu atendas venontan estraron de Italio antaŭ la problemoj de la mondo.

La Kongreso de la popoloj estis ankaŭ okazo por disdoni flugfoliojn al homoj kun alvoko al paco de la esperantistoj kaj rilati kun multaj asocioj pacemaj, kiu startis kunlaboron por propagandi Esperanton kiel lingvon de la paco. Estis ankaŭ prezentita iniciato de Komunumo de urbo de centra Italio, kiu sendos volontulojn al Kipro pro projekto pri paco, al kiu mi ĉeestis por kompreni ĉu Esperanto povus roli iel. Ni vidos.

Andrea